A.E.A.-informilo

Numero 3 Aprilo 2007

# Forpasis William Auld



William Auld

Mortis William Auld, unu el la plej grandaj esperantaj verkistoj de ĉiuj tempoj. Li naskiĝis la 6-an de novembro 1924, kaj forpasis matene la 11-an de septembro 2006, du monatojn antaŭ sia 82-a naskiĝtago. Auld estis la aŭtoro de poezia verko La Infana Raso, iu vera originalaĵo en nia Internacia Lingvo. Li estis aŭtoro ankaŭ de aliaj poeziaj verkoj: Tempo fuĝas, Pajleroj kaj stoploj, kaj ankaŭ pri Esperanto: Paŝoj al plena posedo, Pri lingvo kaj aliaj artoj, Traduku...

Li ankaŭ estis tradukisto de multaj verkoj en la angla lingvo al Esperanto, inter ili tiuj de Sekspiro (Sakespeare).

Por la internacia publiko William Auld iĝis pli konata en 1952, post la apero de la poemaro Kvaropo, kie li kunlaboris kun John Dinwoodie, John Francis kaj Reto Rossetti. Kvaropo signis la debuton ankaŭ de la nova eldonejo Stafeto, kiun fondis Juan Régulo Pérez en La Laguna en la Kanariaj insuloj. Tiu nova elstara eldonejo helpis ŝtopi la breĉon, kiun kaŭzis la malapero de la eldonejo de Literatura Mondo en Budapeŝto.

Homoj mortas, sed iliaj verkoj povas esti senmortaj, kaj la memoro pri William Auld vivos tiom longe, kiom en la mondo restos legantoj de libroj en Esperanto.




Verkoj de William Auld




Tradukoj de William Auld